

Joseph Freiherr von Eichendorff,
Printempa nokto

tradukita de Manfredo Ratislavo

Super mi tra la aeroj
Migrobirdojn aŭdas mi.
Jam odoras aromeroj
Kaj ekfloras ĉie ĉi.

Emas mi jubili, plori,
Nekredebla estas ĝi!
Malnovaĵoj volas sori
Kun la luna bril' al mi.

Steloj diras tion, kion
Songas arboj ĉirkau mi,
Najtingaloj kantas tion:
Estas via ŝi, jes ŝi!

*Traduko de la Germana poemo "Frühlingsnacht" de JOSEPH FREIHERR VON EICHENDORFF (*1788-03-10 – †1857-11-26) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 2001-04-07.*

MR-345-1a / Arg-220-436 (2004-04-09 17:01:32)